EKO 2020-04 sendita la 24an de januaro el Masterton, Nov-Zelando.

# Kontinente kompleta nia juna AMO-programo

Dudeko da Aŭstralianoj kaj Nov-Zelandanoj kuniĝis en la 17a kaj 18a de januaro tra ses horoj por vivigi la 62an Seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO). Temas pri la unua seminario de 2020 kaj la nova jardeko. Eble pli grave, la programo finfine aldonas sian kvinan kontinenton. Ene de ok monatoj de la unua seminario en marto 2014, la programo jam atingis kvar kontinentojn: kun du seminarioj en Ameriko (norda kaj suda), unu en Azio kaj unu en Afriko. Iom poste la programo penetris la regionon MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko) kaj nun fine Oceanion.




La temo ‘Florigi Esperanton tre for de Europo’ estis traktita en du fazoj: unue, analizo, due, solvado-serĉado. La analizo estis farita laŭ la FLAM-sistemo: trovi la Fortojn kaj Lamaĵojn de la Oceaniaj movadoj, poste listigi la pozitivajn kaj negativajn (do, la Avantaĝojn kaj Minacojn) de la Oceania viv-medio. Tio daŭris 3 horojn en 3 grupoj, kun fina reraportado. La rezultoj de tio poste aperos en la retejo <aktivulo.net>. La dua fazo rezultis en la sekvaj rekomendoj.



En la foto Ivan Pivac, la nova prezidanto de NZEA kaj (skribante) Penny Vos, la nova reprezentanto de ILEI por Oceanio (AU plus NZ)

REKOMENDOJ de la 62a AMO ------------------

- Okazigi lingvajn festivalojn; altiri lingvemulojn  kaj atesti la ekziston de esperantistoj.
- Kuniĝi kun similideanoj: aktivuloj kaj asocioj kun celoj parencaj al Esperantismo.
- Vidigi sian esperantistecon en netrudaj manieroj.
- Ekspluati la akceptemon de progresemaj lernejoj, kiuj aprezas alternativajn projektojn.
- Krei laborbazarojn, retlokojn, kie eblas parigi projektojn kaj ideojn kun homoj kun laborfortoj.
- Proponi servojn al nemovadaj fakaj asocioj – nia varo: justaj internaciaj kontaktoj.
- Pli aktive engaĝiĝi ĉe ekologiaj movadoj kaj tiuj pri daŭripovaj vivstiloj.
- Evoluigi allogaĵojn, kiuj plaĉos al pli junaj personoj.
- Konigu kaj utiligu filmojn en *Youtube* (iuj havas subtitolojn), <facila.org> kaj similaĵoj.
- Kreu ilojn por konvinki universitatojn starigi kursojn (La eduka valoro de Esperanto)
- Kiel havigi al la Eo-klubo en la Universitato de Aŭklando instruistojn aŭ instruantojn.
- Pli aktive konigi la maorian kulturon tra la mondo – unue per Vikipedio.
- Eluzu la esperantistajn tagojn, ankaŭ la Tagojn, Jarojn, Jardekojn de UN kaj Unesko.




Tiu AMO-seminario okazis en la fino de la septaga Komuna Kongreso por Aŭstralio kaj Nov-Zelando, en Aŭklando, la plej granda urbo de Nov-Zelando. Ĝi altiris 45 aliĝintojn, kun ĉ. 40 efektivaj partoprenintoj. Vidu la foton. La programo estis surprize riĉa, kaj entenis la tradician Someran Lernejon, en kiu gvidis la komencantan grupon s-ino Cecily Lee, la mezan Stefan MacGill kaj la superan Duncan Charters. Aldone al prelegoj, kulturaj aranĝoj kaj teatra vespero, okazis du ekskursoj, unu al regionaj belaĵoj, la alia al la renoma Artgalerio de Aŭklando, kun gvidado en Esperanto. La kongresejo konvenis, kaj la etoso estis unike antipoda. Kongresanoj venis el Aŭstralio, Ĉinio, Germanio, Hungario, Nov-Zelando kaj Usono.

Vortoj 300.